Thomas Moore,

La lasta rozo

tradukita de Clarence Bicknell

kun ok-liniaj strofoj

Jen la lasta rozeto
de fora somer'!
Ĝiaj belaj kunuloj
jam velkis sur ter'!
Ne restas parenco,
ne unu rozflor'
Partoprenas kompate
en ĝia dolor'.

Mi ne lasos vin velki
tutsola, ho roz'.
Iru dormi kun ili
en paca ripoz'.
Nun viajn petalojn
disĵetas mi for
Al viaj kunuloj
sen viv', sen odor'.

Tiel same volonte
formortus mi mem,
Se ne plu min atendus
amika manprem'.
Ĉar kiu kun koro
en tiu ĉi mond'
Volus loĝi izola
sen amo-respond'?

Traduko de la Angla poemo "'T is the Last Rose of Summer " de Thomas Moore *(∗1779-05-28 – †1852-02-25) en Esperanton de* Clarence Bicknell *(∗1842-10-27 – †1918-07-17).*

Arg-531-1060 (2014-02-15 14:00:59)

Mi, Manfred Retzlaff, trovis tiun ĉi poem-tradukon en folio kun kantoj prezentitaj dum la 12a jarkunveno de Germana Esperanta Fervojista Asocio (GEFA), la 12-an de oktobro 1968. Pri la tradukinto vidu la retejon `http://eo.wikipedia.org/wiki/Clarence_Bicknell`.